Prezo: 7 €
www.satesperanto.org
Novembro - Decembro 2015 | n-ro 11–12 (1325-1326)

# Sennaciulo

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA




SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

Ju pli da imperiismo...













...des pli da terorismo

# ✍ REDAKTANGULO ✍

Karaj legantoj,

Post rifuĝintoj, alia konsekvenco de la mezorientaj militoj vekis lastatempe la atenton de la amaskomunikiloj. Terorismaj atencoj detruis vivojn de civiluloj en Ankaro, Bejruto, Parizo, kaj de flugontoj al Peterburgo super Sinajo. Al tio registaroj respondas per urĝostato, pliaj militaj intervenoj, kaj pli strikta kontrolo al migrantoj. Ili cinike malkaŝas la imperiismajn motivojn kaj kompromitiĝojn kun teroristoj de la konkurantoj, prisilentante la proprajn. Ĉu mirige, sciante ke ekzemple en Francio, tiu laŭdira lando de libereco kaj frateco, la amaskomunikilojn posedas ĉefe armilvendistoj?

Malfacilas havi vere akuratan superrigardon pri la okazaĵoj en tiuj mondopartoj. Tion substrekas ĉi-numere la debateto pri atencoj en Ankaro, kaj la instigo al kritika sinteno fronte al kontraŭ-imperiismo kaj sistema glorigo de laboristaro. Ĝuste pro tio ekzistas SAT : ni per interŝanĝoj de faktoj kaj opinioj klopodu iom post iom kreskigi nian komprenon pri la funkciado de la mondo, kaj pere de tiuj interŝanĝoj trovu solvojn por antaŭeniri, je individua kaj kolektiva nivelo.

La Redaktoskipo

## Venontaj limdatoj

Sennacieca Revuo 2016 : 31a de decembro 2015

Sennaciulo 3-4 (1329-1330) : 20a de januaro

Sennaciulo 5-6 (1331-1332) : 20a de marto

### Adresaro

Baldaŭ aperos nova eldono de nia adresaro. Se iu deziras ke iu konkreta lia dateno ne estu publikigita, li informu al ni kaj ni agos laŭ la ricevitaj indikoj.

### Alvoko al kandidatiĝo de nova PK-ano

Sekve al demisio en novembro de k-do *Soubourou* (Ŝtonĉjo), la PK provizore funkcias sepope, kaj urĝe serĉas anstataŭanton, por pli bona dispartigo de la plenumenda laboro. La punktoj pri kiuj estas prioritate bezonataj pliaj homfortoj estas : kunordigado de la apero de Sulo kun diversaj suplementoj (SR, adresaro, aliĝiloj...), rilato kun la perantoj, kaj rilatoj kun la kongresorganizantoj. Kandidatoj anoncu sin rekte al la nova oficiala SAT-adreso (kontakto @satesperanto.org). La PK traktos la diversajn proponojn okaze de sia kunveno de la 23a de januaro.

# Enhavo


## Socio

4 La fendo de l' mondo CEZAR
4 Antaŭ 70 jaroj Japanio malvenkis NONOMURA YO
5 Por fini kun la problemo de "la du liberalismoj" ! R. PLATTEAU
6 Kelkaj notoj pri agrabla vizito JUAN CARLOS MONTERO
6 La alia flanko de niaj maljunulejoj ! ROGER CONDON
9 Alvoko de universitatuloj kaj intelektuloj por monda solidareco post la atencoj en Ankaro VITO MARKOVO
10 Proklamo de la Rusia sekcio de LP-IKO pri la 98-a datreveno de la Granda Oktobra socialisma revolucio

## Liberpensula Frakcio

12 Kontraŭklerikala literaturo MIGUEL FERNÁNDEZ

## Medio

13 Prinutra sekureco kaj civitana agado DANIÈLE CHARIER
14 Reproduktado kaj interŝanĝado de semoj ROBIN' BETO
15 Fari ekspedicion GUNNAR DECKER

## Beletro

16 Motivo de la labirinto WLODZIMIERZ PAZNIEWSKI
16 Ne ŝovu vian nazon... CEZAR
27 La Korto
28 Aŭtuna poezio

## Intelekta memdefendo

17 Antisemitismo, kontraŭusonismo kaj glorado de la laborista klaso DOMINIK SCHRAMM
18 Pri la koncepto de "tria" mondo
20 Enigmoj

## Tra Esperantio

21 La pinto de l'AMO atingita, kaj eĉ plio
22 La Kompanoj 2015 - Longaj preparadoj sed kiaj kolektivaj sukcesoj ! MARCELO REDULEZ
24 La Kompanoj 2015 - Raporto de Flora MARKOV

## SAT-anoj aktivas

25 Esperanta proleta vespero en Valencio GUILLEM GÓMEZ
27 Manifestacio en Hokkajda universitato ĈANC TOMOE

## Nekrologo

25 Antje Noordewier 1926-2015

## El la SAT-Administrejo

26 Landaj Perantoj | Kotizoj | Praktikaj informoj | Donacoj


*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn ni ne resendas. Kontribuojn sendu al:*
***sennaciulo.redaktejo@gmail.com***